# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270


# 2019.4

**La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn**



## Estimataj gelegantoj,

la 2019-a jaro estas signifohava por IFEF el du motivoj. Unu estas 110-jara datreveno de ekesto de fervojista esperanta movado kaj la dua estas elekto de nova estraro. Ĝi okazis dum la 71-a IFEF-kongreso en Malago kaj komisiis la membrojn de la IFEF-estraro por la venontaj tri jaroj. La rezulto de ĝi estas jam konata. Permesu al mi mencii kelkajn rimarkojn rilate la IFEF-baloton.

Jam pasintjare okazis laŭstatute elektoj de ĉefkomitatano kaj gvidantoj de Faka Komisiono kaj Fake Aplika Sekcio. Bedaŭrinde fine de la pasinta jaro ni perdis tre spertan kaj laboreman gvidanton de Terminara Sekcio D-ron Heinz Hoffmann. Lia laboro en la terminologia kampo estas tiel grava kaj meritplena, ke estis necese trovi lian posteulon. Tiun taskon afable transprenis Guido Brandenburg, kiu kapablas daŭrigi en lia laboro. Por gajni sufiĉe da tempospaco por terminologia laboro estis necese liberigi lin de la IF-redaktoreco.

Tiamaniere okazis, ke mi kapjesis je la propono kandidatiĝi kiel redaktoro de IF. En Malago la IFEF-komitato konfirmis min en tiu posteno kaj nun mi staras antaŭ vi kiel redaktoro de nia bulteno. Mi substrekas nia bulteno, ĉar mia celo estas prepari por vi interesan kaj riĉenhavan periodaĵon en kiu vi trovos informojn pri la agado de IFEF, pri teknikaj interesaĵoj, pri vivo en landaj asocioj ktp. Mi klopodos esti almenaŭ tiel bona, kiel estis Guido Brandenburg en tiu ĉi posteno. Lia aktivado en funkcio de IF-redaktoro alportis por IF altan kvaliton, interesan enhavon kaj perfektan prilaboron, pro kio apartenas al li sincera danko.

Por mi tio estas modelo kaj devontiĝo ne perdi vian konfidon kaj favoron. De vi, estimataj gelegantoj, mi atendas viajn kontribuaĵojn, konsilojn, kritikojn, sugestojn ....

Sian laboron en redaktora komisiono finis ankaŭ Jean Ripoche, al li mi volas ankaŭ danki pro lia multjara aktiveco.

**Via redaktoro**

# Enhavo:

Estimataj gelegantoj ........ **62**
Enhavo, presindiko ........ **63**
Unika triopa kongreso 1.5. – 9.5.2019, Malago, Hispanio ........ **64**
Solena malfermo ........ **65**
IFEF laboraj programeroj ........ **66**
Prelegoj ........ **68**
„Najbaroj“ – unuaj informoj pri la 72-IFK ........ **72**
Protokolo pri la publika komitatkunsido ........ **74**
Raporto de ĉefkomitatano pri estrarelektoj ........ **84**
Listo de E-aranĝoj ........ **84**
Agado en landaj asocioj ........ **86**
Amuza anguleto ........ **88**

Titolpaĝo: Pablo Ruíz Picasso, famkonata Malagano sur *Plaza de la Merced*

**Internacia Fervojisto**
Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro
Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**
**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) rodica_todor@yahoo.com
**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it
**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net
**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz
**Gvidanto de la Faka Komisiono:** Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

**Membroj de la Redaktora Komisiono**
Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**
Guido Brandenburg (Germanio)
Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko)

**Bank-Konto:**
**Nomo:** „Laurent Vignaud”
**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237
**BIC:** PSSTFRPPNTE
**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo**: www.ifef.net
**Facebook:** https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372



71a IFEF-Kongreso, 78a Hispana E-Kongreso, 21a Andaluzia E-Kongreso

## Unika triopa kongreso 1.5. – 9.5.2019, Malago, Hispanio

Vere nekutima evento okazis dum komenco de Majo en la andaluza urbo Malago sude en Hispanio. La urbo ĉirkaŭita de najbaraj montaroj kuŝas sur mediteranea marbordo konata ankaŭ sub indiko *Costa del Sol* – Suna Marbordo. Kun siaj preskaŭ 600 mil loĝantoj ĝi estas la plej sude troviĝanta grandurbo de Eŭropo. Proksime de ĝi kuŝas famaj ĉemaraj ripozlokoj, ekz. *Marbella*, *Torremolinos* kaj multaj aliaj.
Malagon elektis la LKK-anoj kiel lokon por okazigi renkontiĝon por 165 aliĝintaj gepartoprenantoj el supre menciitaj esperantaj organizaĵoj kaj interesuloj. Ĝi estis vere bona solvo, ankaŭ pro tio, ke gekongresanoj povis ĝui agrablan restadon en kongresejo Dioceza Domo, kie okazis ĉiuj kongresaj programeroj en diversaj salonoj nomitaj laŭ por ni bone konataj kaj estimataj esperantistoj *Joachim (Gießner), Henning (Olsen)* kaj *Heinz (Hoffmann).* Eĉ loĝado kaj manĝado estis eblaj en la sama konstruaĵo, kio multe kontribuis al kontenteco de gepartoprenantoj.
Sufiĉa nombro da salonoj de diversaj grandoj ebligis organizi samtempe kursojn, prelegojn, ekzamenojn ktp. Nur dum oficiala inaŭguro, koncertoj kaj aliaj programeroj dediĉitaj por ĉiuj, amasiĝis gekongresanoj de ĉiuj tri ĉeestantaj E-organizaĵoj en granda salono *Joachim.* Dank´ al tio estis en publiko rimarkeblaj ankaŭ junaj vizaĝoj kaj esperantistoj el foraj landoj – ekz. Brazilo, Suda Koreio, Meksikio k.a.
Mi prezentu koncize la kunorganizantojn de la triopa kongreso. Unua estas la Hispana Esperanto-Federacio (HEF) fondita en la jaro 1947 nun havanta 15 kolektivajn kaj 200 individuajn membrojn. Ĝia celo estas la

disvastigo de Esperanto per informado, per aranĝado de kursoj kaj la diskonigo de la hispana kulturo. En la jaro 1993 ĝi estis nomumita asocio de „publika utilo“ pro sia laboro kaj agado socie kaj kulture interesaj.
Dua estas la Andaluza Esperanto Unuiĝo (AEU) – ĝia historio komenciĝis en la jaro 1890.
Ĝi aranĝas renkontiĝojn, eldonas bultenon ktp. sen monsubteno de ekstere.

## Solena malfermo

Kvankam diversaj aranĝoj, prelegoj kaj kunsidoj de ambaŭ hispanaj E-organizaĵoj komenciĝis jam la 1-an de Majo, la solena inaŭguro okazis antaŭtagmeze la 4-an de Majo en granda salono *Joachim*. Sur la podio (vd. foton) sidis reprezentantoj de organizantaj asocioj kaj gastoj: de maldekstre – Carlos G. Spinola – prezidanto de LKK, José Antonio del Barrio – prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Isabel Lozano – reprezentantino de urba administrado, gvidantino de kultura fako, Rodica Todor – prezidantino de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Ángel Arquillos López – prezidanto de Andaluzia Esperanto Unuiĝo kaj Fernando Jorge Pedrosa Maia jr. - reprezentanto de UEA.
La reprezentantoj en siaj inaŭguraj paroloj prezentis siajn organizaĵojn, salutis partoprenantojn kaj komune deklaris la triopan kongreson malfermita. Poste la solena kunveno daŭris per salutvortoj de partoprenantoj el 24 landoj. Multaj estis bone konataj, sed malantaŭ la pupitro aperis ankaŭ parolantoj el (inter fervojista publiko) nekutimaj landoj – Suda Koreio, Brazilo ktp. Ankaŭ pro tio la triopa kongreso estis unika.


Prezidantaro de la kongresoj

Kiel kutime, sekvis komuna fotado sur sunbrila korto de la Dioceza Domo.



Gepartoprenantoj de la Triopa kongreso
(foto Guido Brandenburg)

## IFEF laboraj programeroj

Dum la kongresaj tagoj estis traktataj gravaj aferoj, ĉefe organizaj taskoj de la Federacio: financaj raportoj, movadaj aferoj, strategio por venontaj jaroj, prezento de la venonta kongreso, 110-jara ekzisto de E-movado inter fervojistoj kaj aliaj.

Gravaj decidoj okazis dum la komitatkunsido, kiu nunjare kunigis la apartajn nepublikan kaj publikan komitat-kunsidojn konatajn el pasintaj kongresoj. Enhavo de raportoj de unuopaj federaciaj funkciuloj estas prezentita en la Protokolo de la sekretario (vidu sube). Krome oni multe diskutis pri la situacio de fervojista esperanta movado en Ĉinio, Japanio kaj Belgio, kiu ne estas tute klara. Pro malaperantaj landaj asocioj pligraviĝas la rolo de individuaj membroj de IFEF en tiuj landoj, kie la oficiala organizaĵo ne ekzistas aŭ ekzistas iu ajn problemo. Oni parolis ankaŭ pri la „Internacia fervojisto“ cele pliriĉigi ĝian enhavon, ke ĝi estu alloga por vasta publiko.

Sufiĉe longa diskuto okazis pri la temo de fakdelegitoj ĉe UEA por fervojo. Konate ili nur tre malofte estas demandataj, ne troveblas iu regulo por ilia laboro flanke de UEA. Atentindajn informojn eksciis la aŭskultantoj pri FISAIC de ĝia ĝenerala sekretario Jan NIEMANN, kiu

parolis pri la nuntempa situacio en organizaĵo. Ankaŭ FISAIC suferas pro la disdivido de eŭropaj fervojadministracioj je ŝtataj kaj privataj entreprenoj kaj lastatempe eĉ pro lingvaj problemoj en deĵora kontakto inter la membroj.

Dum la komitatkunsido okazis balotoj de nova estraro. Raporto de ĉefkomitatano pri ĝi estas sube. Jen estas la nova estraro:

Sidantaj – Vito TORNILLO, Rodica TODOR, Ladislav KOVÁŘ

Starantaj – Jan NIEMANN, Laurent VIGNAUD



Nova estraro de IFEF por la jaroj 2019 – 2022
(Foto Ángel Arguillos López)

Diskuto pri movadaj aferoj denove tuŝis situacion en landoj, kie ekestis problemoj – Ĉinio, Japanio. Esperiga estas situacio en Belgio, kie estis fondita klubo de amikaro de fervojo. Al hispanaj kolegoj estis adresita sincera danko pro iliaj kunlaboro kaj subteno de la IFEF-kongreso.

En agado de IFEF montriĝis konvena sistemo de laborgrupoj, kiuj prizorgas diversajn sferojn de federacia agado kaj kiuj strebas envolvigi en laboron ankaŭ membrojn de landaj asocioj. Iliaj gvidantoj prezentis siajn raportojn en kiuj ili parolis pri sia agado. Nove estis starigita laborgrupo pri fakdelegitoj sub gvidado de Jindřich TOMÍŠEK kaj grupo por individuaj membroj, kiun prizorgos Ladislav HAKL.

Grava punkto en programo de movadaj aferoj estis diskuto kaj adapto de regularo pri datumprotektado en la Federacio. La eŭropa regularo

estis akceptita jam en la jaro 2016 kaj estas necese adapti al ĝi la laboron de IFEF. Kernan tekston de datumprotekta regularo preparis prezidantino kaj ĉeestantoj vigle diskutis pri ĝia enhavo kaj kompletigo. Je la fino estis akceptata versio kun proponitaj ŝanĝoj (vidu www.ifef.net).

## Prelegoj

La nunjara kongreso estis, krom aliaj aferoj, interesa ankaŭ pro abunda oferto de diversaj altkvalitaj prelegoj. Ne estis en tempoeblecoj de la kongresanoj partopreni ĉiujn, ĉar ili okazis iam samtempe kun aliaj programeroj, kiuj apartenis al programo de nefervojistaj kongresorganizantoj. La ĉefa prelego, kiun konas fervojistaj kongresanoj el antaŭaj kongresoj, okazis en salono *Heinz* kaj, fakte konsistis el du prelegoj. La unua kun titolo „HYPERLOOP, la morgaŭa fervojo“ de José María RODRIGUEZ HERNANDÉZ temis pri moderna transportilo konstruita laŭ imagoj de Elon MUSK. En ĝia realigo aktive partoprenas andaluzia industrio en proksima *Cádiz*. Nuntempe estas jam konstruita kapsulo, kiu estos uzata dum provveturoj (pli bone dirite provflugoj) en tubo konstruata nun en usona dezerto. Oni supozas atingi rapidon ĝis 1 200 km/h. La dua prelego prezentis tute aliajn vojojn ol konas fervojistoj sub nomo relvojo. Ĝin preparis Carlos SPINOLA, kiu okupiĝas pri astronomiaj aferoj kaj titolis ĝin „Veturado tra interplaneda spaco“. Komence de la prelego li klarigis fundamentajn fizikajn leĝojn aplikatajn je moviĝo de masaj korpoj kiel planedoj kaj ĝiaj satelitoj kaj montris evoluon de sciencaj klarigoj de tiu fenomeno ekde la mezepoko ĝis nun. La aŭtoro konatigis aŭskultantojn kun la principoj kiamaniere eblas superi gravitajn fortojn de la Tero kaj atingi orbiton aŭ loki satelitojn en stabilajn poziciojn rilate al Tero. Tiuj principoj estas ĉiufoje



S-ro Rodriguez dum prelego

uzataj dum lanĉo de raketoj al orbito de la Tero aŭ en la spacon. Fine de prelego estis prezentitaj ekzemploj de interplanedaj vojaĝoj realigitaj per diversaj misioj – *Voyager*, *Cassini* k.a. dum kiuj estis praktike uzitaj precizaj matematikaj kalkuloj de iliaj trajektorioj kaj efikoj de gravitaj fortoj de planedoj, kiujn ili preterpasis por akceligo aŭ malakceligo de interplaneda sondilo. Por detala priskribo de principoj, kiamaniere funkcias propulsaj motoroj ne restis jam multe da tempo. Tamen estis montritaj almenaŭ bildoj de iliaj fundamentaj tipoj.



S-ro Carlos SPINOLA prelegas

Dum la faka kongresa programo estis prezentataj ankaŭ fervojaj temoj. Lene NIEMANN montris aktualan projekton de Danaj Fervojoj pri novkonstruo de *Køge* Norda stacio sur linio Kopenhago - *Ringsted*, kiu estas grava loko por trafiko uzante grandrapidan fervojon, ekzistantan fervojon kaj aŭtoŝoseon kun preparo de aliro al granda malsanulejo, kiu estos konstruata en proksimeco.



Foto el projekto Køge Kist Nord

En la projekto estas moderne solvitaj transiroj de pasaĝeroj el unu al alia transportilo per tubo transiranta kaj fervojon kaj ŝoseon.

Alian interesan prelegon prezentis Zlatko HINŠT, kiu parolis pri urba trafiko el vidpunkto de piedirantoj. Problemoj kun urba trafiko estas konataj en multaj urboj kaj prave vekis intereson en publiko. Ni rememoru alian prelegon je la sama temo el pasinta kongreso en Vroclavo, kie Guido Brandenburg parolis pri modelo de urba trafiko en Karlsruhe. Laŭ propono el publiko estus interese dediĉi sin al tiu temo

ankaŭ dum venontaj okazoj.
La vicon de fakaj prelegoj fermis tri pliaj kontribuoj. La unua el ili estis informo pri rilatoj inter fervojo kaj transportado de bicikloj el vidpunkto de Ladislav HAKL, kiu priskribis situacion en Ĉeĥio. Transportado de bicikloj per fervojo ŝajnas esti senproblema, sed tamen okazas situacioj, kiuj ne estas simple solveblaj.
En dua prelego s-ino Rodica GIUHAT montris romantikan rumanan fervojon inter Anina kaj Oraviţa, kiu funkcias jam pli ol 150 jarojn, nun plejparte pro turismaj celoj en belega montara regiono.
Laste prezentita aktualaĵo de Ladislav KOVÁŘ temis informadsistemon por regionaj fervojlinioj. Grandaj fervojaj administracioj uzas diversajn komputilajn programarojn kun multaj funkcioj kaj pro tio ankaŭ multekostaj. Regionaj fervojoj kun siaj specifaĵoj bezonas programaron konvenan por ili kaj pri tio temis la kontribuaĵo.
Oni ne rajtas neglekti ankaŭ la prelegon de Jan NIEMANN pri 110-jara ekzisto de la fervojista-esperanta movado. Ĉi tiu grava evento estis multfoje menciita dum la kongreso. En la prelego mem estis prezentataj nur kelkaj okazaĵoj el la movado uzante fotografaĵojn kaj dokumentojn el estintaj jaroj. Oni nun preparas ĝisdatigon de historio de IFEF, kiu aperis en broŝura formo sub titolo IFEF Historio kun kompletiga suplemento pri la jaroj 1984 – 1999 de Joachim GIESSNER. De tiu tempo jam pasis 20 jaroj dum kiuj la movado atingis multajn sukcesojn, kiujn estas necese kompletigi, prilabori kaj prezenti por estontaj jaroj. Tio signifas penan kaj temporaban laboron, kiun transprenis laborgrupo por arkivado. La nova ĝisdatigo de la historio aperos en tiu ĉi jaro.


Jan NIEMANN parolas pri historio de IFEF

Dum la kongreso estis prezentataj multaj aliaj prelegoj. Ne estas eble detale priskribi ĉiujn, tamen almenaŭ kelkajn.
Fervojan temon havis ankoraŭ dua prelego de José RODRÍGUEZ pri „AVE

al Mekko“. Hispanaj entreprenoj sukcesis konstrui grandrapidan fervojon en araba dezerto inter urboj Medino kaj Mekko sur kiu trafikas hispana grandrapida trajno AVE.

Prelego „La angla lingvo en la Eŭropa Unio post la briteliro“ de Federico GOBBO el Italio priskribis mezepokajn klopodojn solvi problemojn inter reĝlandoj en Eŭropo ĝis ekesto de Eŭropa Unio. Li menciis problemojn kun kiuj la EU nun batalas kaj inter aliaj ankaŭ lingvan problemon.

Interesa estis diskuto ĉirkaŭ „ronda tablo“, kiun partoprenis Seán O´RIAN irlanda diplomato, Katalin KOVÁTS filologino, respondeculino pri KER-ekzamenoj ĉe UEA, Federico GOBBO interlingvisto kaj José RODRIGUEZ juristo. La diskuto temis ĉefe pri la rolo de Esperanto en nuntempa Eŭropo, akcepto de Esperanto kiel nemateria heredaĵo pere de registaroj de Pollando kaj Kroatio, praktikaj problemoj pri uzado de angla lingvo en eŭropaj institucioj kaj aliaj.



Diskuto ĉe “ronda tablo”.

Al interesaj prelegoj apartenis ankaŭ informo de Ralf FRÖHLICH – juna berlinano – pri fervojstacio Halbe en Berlino, kies stacidomo jam ne estas uzata por fervoja trafiko. Ralf rekonstruas ĝin kiel instrucentro kun eblecoj por kunvenado, instruado kaj loĝado. La stacio estas atingebla per trajno el Berlino, aŭ aŭtomobile. Proksime ankaŭ troviĝas flughaveno Schönefeld. Agrablan refreŝiĝon proponas bela ĉirkaŭaĵo kaj aliaj interesaj lokoj.

Restas ankoraŭ kelkaj prezentendaj prelegoj, kiujn oni povis aŭskulti en Malago. El ili du, kiuj estis vere instruaj kaj instigaj – „Arkivado“ de Jan NIEMANN kaj „Kiamaniere krei vikipedian paĝon“ de Laurent VIGNAUD.

Priskribo de kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj aperos en venonta numero de Internacia Fervojisto.

**Ladislav Kovář**



Montoĉeno sudokcidente de Malago

# „Najbaroj” – unuaj informoj pri la 72-a IFK




Frankfurt? Kiu Frankfurt?
La prezenton de la 72-a IFK la invitantoj en Malago enkondukis per klarigo,
ke planante la alvojaĝon necesas atenti ke en Germanio troviĝas du Frankfurtoj.

La kontrakto ankoraŭ atendas kelkajn precizigojn kaj la subskribojn de la tri partneroj, la Germana kaj la Pola Esperanto-Asocioj kaj GEFA kiel LA de IFEF. Sed la intenco estas klara: 2020 vidos komunan kongreson de tri organizoj. Ke tio funkcias kun brila rezulto, ni jam spertis en Malago. Tiu-ĉi-foje aldoniĝas, ke la kongreso okazos en du ŝtatoj.

La „Transpontan Kongreson“ gastigos Frankfurt ĉe Odro kaj Słubice, iam du partoj de unu urbo, hodiaŭ du urboj ekzercantaj efikan transliman kunlaboron.

Bona ekzemplo estas „Collegium Polonicum“, la „Pola Kolegio“, kiun fondis kaj komune administras la germana Viadrina- kaj la pola Adam-Mickiewiczs-Universitatoj kaj kiu servos kiel kongresejo. Triope ni komencos kaj restos dum la pentekostaj tagoj kaj ofertos programerojn sumigotaj sub la moto „najbaroj“ – sufiĉe ĝenerala por paroli ankaŭ pri netranĉitaj heĝoj kaj reciprokaj kradrostaj invitoj kaj tamen sufiĉe preciza por tuŝi ankaŭ translimajn energiprojektojn same kiel plursistemajn lokomotivojn ... Ni estas kolektantaj.

La kongresoj komenciĝos komune la 29-an de Majo, la antaŭpentekostan vendredon, kaj finiĝos aparte. Lundon, 1-an de Junio, la gastoj de GEA kaj PEA vojaĝos hejmen kaj tiuj de IFEF restos ĝis vendredo, 5-an de Junio inter si por trakti la federaciajn kaj la fervojfakajn kerntemojn, kaj por ekskursi kompreneble. Kiu volas, aldone povas postkongresi en Leipzig kaj Halle.




Miloj da vizitantoj ĉiutage transiras la stratponton „Stadtbrücke/Most Graniczny“ ...

Plej oportuna vojo al la kongresaj urboj estas la fervoja. La komuna stacio de Frankfurt kaj Słubice estas tiu de Frankfurt, priservata de longdistancaj kaj de regionaj trajnoj. Aviadilaj vojaĝantoj trovos flughavenojn Tegel (TXL) kaj Schönefeld (SXF) en proksima Berlin kaj de tie daŭrigos sian vojon per publikaj trafikrimedoj.

LKK ĝenerale ne ofertos ĉambroperan servon, sed nur rekomendas kelkajn avantaĝajn germanajn kaj polajn hotelojn, kiuj aŭ estas proksimaj al la fervoja stacio aŭ al la kongresejo. Pri ŝancoj kaj organizaj kondiĉoj de lastatempe interkonsentita luo de studentaj ĉambroj ne eblas jam diri ion konkretan.

GEFA momente instalas retpaĝaron sub la tegmento de GEA, ebligantan trovi necesajn, interesajn kaj superfluajn informojn kaj ebligantan retan aliĝon. Legu atente (kiel ĉiam) la sekvantajn eldonojn de Internacia Fervojisto kaj la retejon de IFEF, kie ni komunikos la adreson.



… por marĉandi antaŭ kelkaj de la 425 standoj en la Pola Bazaro malferma ĉiutage inter 8-a kaj la 17-a horo (ankaŭ pentekoste – kaj eŭroj estas same bonvenaj kiel zlotoj)

## Protokolo pri la publika komitatkunsido
### dum la 71-a IFEF-kongreso en Malago (ES) 06.05.2019

Mallongigoj: Pr = prezidanto, Vp = vicprezidanto, Sk = sekretario, Ks = kasisto,
Rd = redaktoro, e-o = estraro, Ĉk = ĉefkomitatano,
IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka Komisiono, TS = Terminara Sekcio,
FAS = Fake Aplika Sekcio, k-o = komitato, k-ano = komitatano,
kk-ano = kromkomitatano, k-go = kolego, HM = honora membro,
HP = honora prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j).
(Landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO 3166)

### 1. Malfermo, konstato de la mandatoj

La Pr-ino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ĉeestas la estraranoj: | Pr-ino | Rodica TODOR | (RO) |
| | Sk | Vito TORNILLO | (IT) |
| | Ks | Laurent VIGNAUD | (FR) |
| | Rd | Guido BRANDENBURG | (DE) |
| | FK | Jan U. NIEMANN | (DK) |
| | Ĉk | Zlatko HINŠT | (HR) |

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

| | *Lando* | *Kodo* | *Komitatano* |
|---|---|---|---|
| | Aŭstrio | AT | Neniu |
| | Belgio | BE | Ne rajtas |
| 01 | Bulgario | BG | Iskra VACHEVA KOPCHEVA |
| 02 | Ĉeĥio | CZ | Ladislav HAKL |
| | Ĉinio | CN | Neniu |
| 03 | Danio | DK | Lene NIEMANN |
| 04 | Francio | FR | Monique GRALL |
| 05 | | FR | Christian DARDENNE |
| 06 | Germanio | DE | Bodo EHRLICH |
| 07 | | DE | Andreas DIEMEL |
| 08 | Hungario | HU | Marta PINTER |
| 09 | Italio | IT | Vito TORNILLO |
| | Japanio | JP | Neniu |
| 10 | Kroatio | HR | Zlatko HINŠT |
| | Kubo | KU | Neniu (Ne rajtas) |
| | Pollando | PL | Ne rajtas |
| 11 | Rumanio | RO | Florin NEGREA |
| | Slovenio | SI | neniu |
| 12 | Gvidanto FK | K-kn | Jan NIEMANN |

Ĉeesto de 9 l.a. 12 komitatanoj

**2. Ricevitaj mesaĝoj.**

**Mesaĝoj pri bondeziroj al la kongreso estis legataj dum la plenkunsido.**

Mesaĝoj alvenis de Sylviane LAFARGUE, HP Romano BOLOGNESI, HM Martin STUPPNIG, Ladislav LÁNI, Teresa POMORSKA, longa gratula letero de la FISAIC Prezidanto Philippe ROUCHE.

**3. Honorigo al la mortintoj**

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 70-a IFK-Vroclavo 2018 ĝis la 71-a IFK-Malago 2019. Oni honorigas ilin per unuminuta silenta starigado; ili ripozu pace.

| Lando | Antaŭ-nomo | Familia nomo | Naskiĝ-dato | Morto-dato | Aĝo | Menciindaĵo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstrio | Elisabeth | HLAUSCHEK | 1945 | 28.05.2018 | | Rd-ino de AEF revuo, estraranino |
| Aŭstrio | Otto | HAMPL | 1925 | 2018 | 93 | |
| Aŭstrio | Gerald | HÖRMANN | 1945 | 16.07.2018 | 73 | |
| Aŭstrio | Engelbert | REDL | 1947 | 2018 | 71 | |
| Belgio | Marcel | DELFORGE | 02.05.1931 | 06.10.2018 | 87 | |
| Britio | Frank | CURTIS | | 01.08.2017 | | |
| Bulgario | Olga | GERASIMOVA | 1932 | 27.09.2018 | 86 | Pr-ino FES en Šumen |
| Ĉeĥio | Anna | PIŠTOROVÁ | 14.02.1934 | 23.06.2018 | 84 | |
| Ĉeĥio | František | ŠMERHA | 26.07.1940 | 04.05.2019 | 78 | |
| Germanio | Karl | BERNHARD | 14.01.1935 | 04.10.2018 | 83 | |
| Germanio | Karl-Heinz | BLOOM | | 10.05.2018 | 81 | |
| Germanio | Heinz | HOFFMANN | 15.01.1939 | 28.12.2018 | 79 | HM de IFEF, Sk de TK, membro de Terminara Grupo de UIC |
| Germanio | Horst | JASSMANN | | 02.2018 | 81 | „FE”- redaktoro |
| Germanio | Johannes | JANKOWSKI | 04.11.1938 | 01.06.2018 | 89 | |
| Germanio | Manfred | RETZLAFF | | | 79 | |
| Germanio | Thea | RETZLAFF | | | | |
| Hungario | Enikö | ZENGÖ SEREGHYNÉ | 1955 | 05.05.2018 | 63 | Estraranino de HEA |
| Italio | Gustavo | GUALANDI | 09.03.1938 | 13.11.2018 | 80 | Pr de NEFA |
| Kroatio | Boris | ČOVIČ | | 01.11.2018 | | |

## 4. Estraranaj raportoj

### 4.1 Sekretario

La Sk legas la resuman raporton. La raporto aperis en IF 2019-3. Neniu demando, nek rimarko. Unuanime aprobita.

### 4.2 Redaktoro

La Rd resumas la raporton kiu aperis en IF 2019-2. La ĝisnuna Rd Guido BRANDENBURG dankas la Rd-komisionon pro la kunlaborado dum la pasintaj tri jaroj. Li informas ke la eldono kaj sendado de la bultenoj estis regule faritaj, papere estis printitaj 60 ekzempleroj kaj rete senditaj. Pri la retsendo li konstatis kelkajn problemojn pro serviloj aŭ spam-programeroj, kiuj ne akceptas la mesaĝojn.
Oni alvokas novajn kunlaborantojn por kune agi kaj kunlabori per novaj artikoloj kun apliko de fakaj terminoj. Venas sugesto por aperigi temojn pri medio kaj klimatŝanĝoj. Mallonga debato okazas por enkonduki en IF

angulon pri ĝeneralaj temoj, ne tro teknikaj. Raporto unuanime aprobita. La Rd adiaŭas la legantojn kaj transdonas la postenon al nova Rd Ladislav KOVÁŘ.
Pri aliaj temoj la diskuto estas daŭrigata en kunveno pri movadaj aferoj.

### 4.3 Kasisto

La Ks legas kaj prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj raporton kiuj aperis en IF 2019-2.
Unuanime aprobita.
La revizorino transdonis atestilon pri la financa kontrolo. La kalkuloj estas en ordo!

## 5. Diskuto kasraporto-bilanco 2018/buĝeto 2020, kotizkonfirmo

Estas konfirmitaj la du membrokotizoj: **9** eŭroj por reta sendo de la revuo, kaj **15** eŭroj por papera sendo de la revuo. Unuanime aprobita.

## 6. Protokoloj de la 70-a IFK Vroclavo (PL)

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolojn tuj post la kongreso, ili aperis ankaŭ en IF. Unuanime aprobitaj.

## 7. Raporto de la ĉefkomitatano

La Ĉk legas la raporton. La Ĉk plendas pro malfruo de sendo de la jarraportoj de l.a., pri kiuj kelkajn li devis instigi plurfoje. Unuanime aprobita.

## 8. Resumo de la jarraportoj 2018 el la landaj asocioj

La Sk legas la raporton, ĝi aperos en nia revuo "Internacia Fervojisto". Pro la fakto ke kelkaj l.a. ne raportis akurate laŭ la demandilo sendita de la Ĉk, kelkaj statistikoj ne reprezentas reale la IFEF-situacion. Raporto unuanime aprobita.

## 9. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)

### 9.1 Gvidanto

S-ro Jan Niemann legas la raporton kaj informas pri la apero de la FervojFaka Kajero n-ro 27, disdonata en papera versio po unu respondeculo el l.a.; reta versio estos dissendita al aliaj membroj kaj

enretigita ĉe IFEF-paĝaro. La enhavo temas pri la prelegoj dum la 70-a IFEF-kongreso en Vroclavo.
Unuanime aprobita.
Pasintjare estis decidite, ke pro la manko de Heinz HOFFMANN la Terminara Komisiono povus funkcii ankaŭ kun du respondeculoj. Sed pro la fakto, ke Guido BRANDENBURG estas preta transpreni la postenon kaj la taskojn de HOFFMANN, la TK laboros denove triope. Ĉefe li daŭrigos la rilatojn kun UIC, kiu daŭre akceptas IFEF-(o)n.

## 9.2 Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)

S-ro Ladislav Kovář legas la raporton de la Sk de FAS. Temas pri agado de Fake Aplika Sekcio kaj ties internaj aferoj:
Dum 2018 aperis 13 informiloj – EFM de s-ro Tomíšek.
En la jaro 2018 estis preparita la 27-a numero de FFK.
Nunjaraj fervojaj foiroj:
Czech RailDays, Ostrava – CZ 11.06.2019 – 13.06.2019
TRAKO 2019, Gdańsk (Danzigo) – PL – 24.09.2019 – 27.09.2019
Preparado de Fakaj Prelegoj dum la ĉijara IFEF-kongreso:
Kelkaj prelegoj prezentitaj dum la pasinta kongreso estis montrataj al partoprenantoj de la jarkonferenco de ĈeFEA. Unuanime aprobita.

## 9.3 Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)

Guido BRANDENBURG iĝas Sk de TS. La UIC-komisiono kunvenas fizike almenaŭ unu fojon jare. En la Faka Terminaro mankas 200 tradukoj, la difinoj ne estas sufiĉe klaraj kaj taŭgaj.
Unuanime aprobita.

## 10. Raportoj de la komisiitoj

### 10.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA

La IFEF-Pr-ino Rodica TODOR legas raporton pri sia posteno ĉe UEA kaj klarigas pri la taskoj kaj la ĝis nun farita laboro de la UEA-komitato. Ĉefe pri la oftaj rilatoj inter la K-anoj kaj la ampleksaj retaj diskutoj. Unuanime aprobita.

### 10.2 Fakdelegitoj ĉe UEA

La posteno aperas nur surpapere. La ĉeestantaj FD konfirmas, ke dum la tuta periodo neniu kontaktis ilin por havi informojn pri IFEF. Kelkaj kontaktoj alvenis nur por peti informojn aŭ gastigadon en la urbo. Eĉ neniu adresis sin al IFEF-estraro.
Por pli aktivigi ilin en UEA, TOMÍŠEK estas proponita kontakti FD kaj kunordigi ilin por realigi pli bonajn rilatojn kun UEA.

### 10.3 Rilatoj al aliaj organizaĵoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF

La FISAIC-Pr. bedaŭras, ke Esperanto ne estos lingvo de FISAIC, sed li pledis por multlingvismo dum la kunveno de FISAIC en Ateno, kiam la plejmulto decidis elekti nur la anglan kiel laborlingvon. La Pr sendis longan gratulleteron por la malfermo de IFEF-kongreso, bedaŭrinde ĝi atingis nin post la eldono de la kongreslibro kaj pro tio ĝi ne povis aperi en ĝi. La FISAIC-Sk Jan NIEMANN estis delegita reprezenti IFEF-(o)n dum la Prezidia Kunsido.
La FISAIC-Sk sendas informojn kaj protokolojn en kvar lingvoj, inter ili Esperanto.
SAT: interrilatoj de membroj de ambaŭ asocioj.
ILEI: kun ĝi estas bonaj rilatoj, membroj de ILEI partoprenas la kongreson kaj zorgas pri la kursoj.
UMEA: personaj kontaktoj de la du prezidantoj.
ISAE: Fakaj informoj aperas en la paĝaro de STEB, prizorgita de ISAE.
TAKE: bonaj rilatoj, ili ĉiu-jare eldonas fakan revuon pri konstruado.
IKEF: La Pr Ĉielismo ĉiam informas pri la agado en diversaj kampoj, eĉ fervoja.

## 11. Kongresproponoj

### 11.1 Estrarelekto

Kiel anoncite, dum la komitatkunsido okazas elekto de la estraro: por kvar postenoj eblas reelekto, por la posteno de Rd estas nova kandidato. Laŭ la indikoj de la statuto estas nomumita komisiono por voĉdonado, (Zlatko HINŠT Ĉk el Kroatio, Jindřich TOMÍŠEK el Ĉeĥio kaj Rodica GIUHAT el Rumanio). Konsisto de la rajtigitaj komitatanoj estas 12, el 9 l.a., du landoj rajtas 2 K-anoj plus 1 Kk-ano. Post la elekto jen la nova estraro:

Rodica TODOR Prezidantino, Vito TORNILLO Sekretario, Laurent VIGNAUD Kasisto, Ladislav KOVÁŘ Redaktoro de la "Internacia Fervojisto" kaj Jan Uldal NIEMANN Gvidanto de Faka Komisiono.
La e-o estas elektita kun 11 voĉoj por. Unu voĉo estas nevalida. La Ĉk, Pr de la elekta komisiono, pretigis raporton pri la balotoj.

### 11.2 Statutrevizia Komisiono

Ŝanĝo en Ĝenerala Regularo.
Nun estas:
*Elektoj § 17 a) Elekto de estraranoj por trijara oficperiodo okazas en jaroj kun nombro dividebla per 3 (tri). Reelekto eblas.*
Devus esti:
*Elektoj § 17 a) Elekto de estraranoj, krom gvidanto de la faka komisiono, kies elekto kaj oficperiodo estas regulita laŭ indikoj en FR, por trijara oficperiodo okazas en jaroj kun nombro dividebla per 3 (tri). Reelekto eblas.*
Unuanime aprobita.

## 12. Analizo de la nuna situacio kaj la estonto de IFEF

Pro manko da tempo la punkto estos traktata dum la kunveno pri movadaj aferoj.
La demando denove venas ĉu faka asocio aŭ ne? Ĉu eblas membriĝi ekster landaj asocioj? La respondo nun estas: ĝis kiam la landaj asocioj havos membrojn kaj fortojn por daŭrigi, IFEF restos federacio, ankaŭ pro tio en landoj kie ekzistas l.a.-j aliĝontoj devos membriĝi pere de ĝi, se ne ekzistas gravaj obstakloj en lando.
La laborgrupoj kaj komisionoj estas starigitaj por disdividi la taskojn inter la membroj. Estus bone ke ĉiu lando havu unu membron en ĉiu grupo.

### 12.1 Raportoj de la laborgrupoj

**Laborgrupo pri eksteraj rilatoj de IFEF**

Pri ĝi bone zorgas nia Pr-ino. Ŝi partoprenas en diversaj esperantaj aranĝoj eksterlande kaj ŝi ne perdas okazon paroli pri IFEF kaj kunlaborado. Kontaktoj ekzistas kun "Kosmo Strategio" por plani novan

seminarion en alia lando.

**Laborgrupo pri rilatoj interne de IFEF**

Jindřich TOMÍŠEK (helpanto de Ĉk) kolektis kaj starigis liston pri landaj kunvenoj, ĉu pri jaraj kunvenoj de l.a., ĉu pri fervojaj aŭ pri organizitaj kunvenoj de niaj membroj. Celo estas kunordigi ilin por ke ili ne okazu samtempe. Ĉi-maniere oni povos interŝanĝi eksterlandajn gastojn kaj farigi landan kunvenon internacia. Oni proponas aperigi la kalendaron en IF por informi IFEF-membrojn.

La reklamilo de IFEF estis jam tradukita al multaj naciaj lingvoj, sed ankoraŭ ne printitaj. Dum la FISAIC-festivalo estis disdonata kun traduko en la franca, germana kaj angla lingvoj.

**Laborgrupo pri historio kaj arkivo de IFEF**

Jan NIEMANN raportis pri la nuna situacio de la suplemento de historio de IFEF de la jaro 1999 ĝis 2019. Ĝi estas preskaŭ preta, mankas ankoraŭ kelkaj aldonaj informoj pri kelkaj landoj, verŝajne ĝi estos preta por la UK en Lahtio fine de Julio. Bedaŭrinde ne venis ĝustatempe kaj precize la informoj de l.a. Por la kongreso li pretigis prezentadon de la 110-jara historio de IFEF kun elektitaj bildoj kaj historiaj dokumentoj. Dum la kongreso NIEMANN prelegis pri arkivado.

**Laborgrupo pri informado**

Ladislav HAKL sendis raporteton pri la agado de la grupo en la lasta jaro. La paĝaro ifef.net estis ne ofte sed regule nutrata per informoj, aldono de dokumentoj kaj fakaj artikoloj. Aperas en ĝi ankaŭ aranĝoj kiuj povus interesi IFEF-anojn.

La IFEF-paĝo kaj -grupo ĉe Facebook estas regule provizataj per fakaj kaj esperantaj informoj, ĉefe pri la kongreso, la ŝatantoj estas pli ol 727, kaj averaĝaj vizitoj estas kontentigaj, ĉar interesiĝas ĉefe nemembroj de IFEF. Dank´ al Facebook ni ricevis iom da interesaj informoj de esperantistoj neligitaj al IFEF.

La IFEF-diskutlisto estas regule nutrata de Leopold PATEK kun aldonaĵoj de aliaj membroj ĉefe pri oficialaj informoj.

Pri Vikipedio dum la kongreso Laurent VIGNAUD aranĝis atelieron. Li

klarigis kiamaniere oni povus krei novan artikolon aŭ modifi/korekti ekzistantan paĝon. Por ĉiuj rimedoj oni rekomendas al l.a. sendi informojn pri kunvenoj, eventoj ktp por aperigi ilin en la reto, ĝi estas bona fenestro por montri la agadon de IFEF pere de l.a.

**Laborgrupo pri financado de projektoj**

Ladislav KOVÁŘ legas raporteton pri la agado. La ĉefa temo estas la seminario okazinta ĉe la Universitato de Pardubice, pere de agado de k-go Jaroslav Matuška, el Ĉeĥio. La aranĝon finance subtenis IFEF kaj Ĉeĥa Landa Asocio de FISAIC. La laborgrupo planas daŭrigi en tiu senco kunlabore kun aliaj universitatoj. Agentejo Kosmo Strategio povus helpi nin por atingi EU-subtenon.

**Laborgrupo pri instruado**

La agado de la laborgrupo estas nacie farita per diversaj kursoj. S-ro Marc CUFFEZ estis la respondeculo de la laborgrupo kaj ek de nun la respondecon transprenis s-ino Kristin TYTGAT. Dum kongreso estis organizita E-kurso, kvankam ne bone lokita en programo. Venontjare ĝi estos pli bone planita por permesi la partoprenantojn viziti la kurson kaj havi eblecon por kunesti en la aliaj aranĝoj.

## 12.2 Strategia laborplano

La strategia laborplano koncernas la venontajn tri jarojn.

## 12.3 Situacio en kelkaj landoj

(Belgio, Ĉinio, Kubo, Japanio, Hispanio…)

La ĝenerala situacio de la landaj asocioj estas pli-malpli la sama de la lastaj jaroj.

- Japanio: Ĝi anoncis malfondon pro la maljuneco de siaj membroj, sed ne reagis al demando pri daŭrigi la rilatojn kun IFEF.
- Belgio: Post la deklaro de malfondo fare de la Pr De SUTTER, kelkaj iamaj membroj, nun IM, rekuniĝos por fondi novan asocion de amikoj de fervojo.
- Kubo: La rilatoj kun la respondeculo de la asocio estas konstantaj, kotizo por la venonta jaro estas jam pagita.

- Ĉinio: Kvankam la Ks plurfoje petis pri la pago de la membro-kotizoj, ĝi ĝis nun ne alvenis. La rilatoj kun ĈFEA estas bonaj kaj daŭraj.
- Hispanio: La iama asocio de Katalunoj ne plu ekzistas, sed se la hispanaj amikoj, kiuj tre ŝatis nian agadon, intencas aranĝi rondon de amikoj de IFEF, ili estos bonvenaj.

## 13. Venontaj kongresoj

### 13.1 Konfirmo de la invito al la 72-a IFK en 2020 en DE

Konfirmo de la urbo: Frankfurt ĉe Oder (kaj Słubice -PL). Ĝi estos triopa kongreso, krom IFK okazos ankaŭ naciaj kongresoj de GEA kaj PEA, samtempe en la pentekosta semajnfino ekde 29-a de Majo 2020.

La LKK prezentis per bildoj la venontan kongreson al la ĉeestantoj. Kunportis printitajn aliĝilojn kaj liston de konsilindaj hoteloj. Pro la fakto ke ili ne sukcesis atingi kun la hotelestroj avantaĝojn por la gekongresanoj kaze de bloka mendo, ĉiuj partoprenontoj mendos mem siajn ĉambrojn en la elektita hotelo. Dum la kunsido LKK raportas pri la situacio de la organizado.

Unuanime aprobita.

### 13.2 Elekto de lando por la 73-a IFK en 2021

ĈeFEA proponas la kongresurbon: temas pri Beroun, proksime de la ĉefurbo Prago. LKK vizitis la urbon kaj havis rendevuon kun la urbo-administrantoj, vizitis kaj elektis la salonojn por la kunvenoj. La sindikato (FISAIC-sekcio) promesis helpi finance. Unuanime aprobita.

### 13.3 Diskuto pri pluaj eblecoj: 2022, 2023

Por la jaro 2022 la belgaj amikoj esploros eblecon kongresi en Belgio.

## 14. Eventualaĵoj

Dum Movadaj Aferoj estis traktata la Regularo pri la datumprotektado. La Pr-ino prezentis adaptitan regularon ĉerpitan de aliaj asocioj, ĝi estas korektata kaj plibonigata de la partoprenantoj.

Unuanime aprobita.

## 15. Libera diskutado

Nenio. Manke de aliaj intervenoj, la Pr-ino fermas la kunsidon.

**Malago, 06.05.2019** La sekretario Vito Tornillo

## Raporto de ĉefkomitatano pri estrarelektoj

Mallongigita, kompleta raporto troviĝas ĉe Ĉk kaj Sk (Rd)

Estrarelektoj estis sekretaj per uzo de paperaj slipoj kun kvin nomoj (personaj kaj familiaj) de IFEF-estraro. Por ĉiu voĉdonanto tasko estis voĉdoni por ĉiu proponita kandidato de estraro per elekto de unu inter eblaj tri starpunktoj: Jes, Ne, aŭ Sindeteno, kaj konfirmi unu jam pasintjare elektitan estraranon, kiu daŭrigas agadon en novelektita estraro. Voĉdonado finiĝis kun rezulto: 12 komitatanoj kaj rajtigitaj voĉdonantoj de landaj asocioj (LA) voĉdonis por kvar kandidatoj de IFEF-estraro - Rodica Todor kiel prezidantino, Vito Tornillo kiel sekretario, Laurent Vignaud kiel kasisto kaj Ladislav Kovář kiel redaktoro de „Internacia Fervojisto“ por periodo 2019-2022 kaj ĝia kvina membro gvidanto de Faka komisiono Jan Uldal Niemann, kiu jam estis elektita unu jaron antaŭe por periodo 2018-2021). Komisiono por voĉdonado (Zlatko Hinšt Ĉk el Kroatio helpe kun Jindřich Tomíšek el Ĉeĥio kaj Rodica Giuhat el Rumanio) konstatis, ke maniero de voĉdonado de 11 komitatanoj estas valida – ĉiuj el ili elektis ĉiujn kvar kandidatojn unuope per Jes kaj konfirmis jam elektitan membron de estraro (per Jes). Unu voĉdonanto signis nur unufoje Jes, sed ne metis signon (krucon) por ĉiu kandidato unuope kaj ne konfirmis kvinan membron unuope. Pro tio la koncerna komisiono deklaris ĉi-tiun slipon nevalida. Informoj pri rezulto de voĉdonado dum kongreso estis transdonataj al sekretario de IFEF Vito Tornillo por ke li enigu tion en protokolon pri kongreso en Malago.

**Zlatko HINŠT** ĉefkomitatano de IFEF

## Listo de E-aranĝoj. (dua duono de la jaro 2019)

**6. - 15. Julio, 55-aj Baltiaj E-Tagoj, BET** – en Panevežys, Litovio. Retadreso: litova.ea@mail.lt

**13. - 20. Julio, 52-a ILEI – kongreso** – en Ĉaĉak, Serbio. Retadreso: mirejo.mireille@gmail.com

**14. - 20. Julio, Ekskurso tra tri baltaj landoj.** Informoj: litova.ea@mail.lt

**20. - 27. Julio, Universala Kongreso de Esperanto, UK** – Lahtio, Finnlando. Organizas: Universala Esperanto-Asocio. Retadreso:

kongresoj@co.uea.org. Por pliaj informoj vidu retejon: https://uea.org/kongresoj/

**20. - 27. Julio Internacia kongreso de Blindaj esperantistoj (85-a IKBE)** – en Lahtio, Finnlando. Retadreso: steleto@pp.irat.fi

**28. Julio – 4. Aŭgusto, 75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK (TEJO-Kongreso)** – Liptovský Hrádok, Slovakio. Organizas: Retadreso: ijk2019@tejo.org

**4. - 11. Aŭgusto, 92-a SAT-Kongreso en Barcelono, Katalunio, Hispanio.**

Retadreso: kontakto@satesperanto.org

**10. - 17. Aŭgusto, 69-a KELI-kongreso** – Révfülöp, Hungario. Retadreso: agnes@raczkev-eotvos.com

**24. - 31. Aŭgusto 86-a Itala Kongreso de Esperanto** –Trieste, Italio.

Retadreso: kongreso@esperanto.it

**14. Septembro Jarkunveno de Rumana Esperanta Fervojista Asocio (REFA),** Bukareŝto. Retadreso: rodica.giuhat@yahoo.com

**20. - 22. Septembro, Jarkunveno de Pola Esperantista Fervojista Asocio (PEFA), Poznań, Pollando.** Retadreso: wlib24@o2.pl . Samtempe okazas jubilea XXXV-a ARKONES – 20.-22. IX.2019.

**24. – 27. Septembro, 13-a Internacia Fervoja Foiro Trako 2019, Gdańsk, Pollando.** Retadreso: www.trakotargi.amberexpo.pl

**29. Septembro – 2. Oktobro, Seminario pri Esperanto - mono kaj Esperanto – medaloj,** Herzberg am Harz - la Esperanto–urbo, Germanio.

Retadreso: esperanto-zentrum@web.de

**11. - 13. Oktobro, Konferenco de Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio,** Kořenov, Ĉeĥio. Retadreso: cefea@centrum.cz

**17. - 20. Oktobro, Kongreso de Ĉeĥa Esperanto Asocio,** Brno, Ĉeĥio. Retadreso: cea@esperanto.cz .

**16. - 17. Novembro, Internacia Radioamatora Konkurso de ILERA.** Retadreso: dj4pg@t-online.de

**21. - 27. Decembro, 7-a Afrika Kongreso de Esperanto,** Buĵumburo, Burundio. Retadreso: ake-7@yahoogroups.com

**27. Decembro – 3. Januaro 2020 11-a Junulara Esperanto – Semajno, JES,** Gluchoł·azy, Pollando. Retadreso: jes@pej.pl

**28. Decembro – Esperanta Silvestro en Česká Třebová,** Ĉeĥio.

Retadreso: kovar.lad@email.cz
Preparis: Jindřich TOMÍŠEK, mallongigis Rd

## Agado en Landaj Asocioj

### Danlingva paĝo pri IFEF en Vikipedio

Dank´ al laboro de Lene NIEMANN aperis nova retpaĝo pri IFEF en dana lingvo. Vidu: https://da.wikipedia.org/wiki/IFEF
Nun tiu IFEF-paĝo estas konsultebla en la dana, esperanta, franca kaj latina lingvoj. Ĝi atendas tradukojn al viaj lingvoj! Ne hezitu ekfari, eĉ nur tradukante la krudan tekston (sen enmeto de ligiloj, grasaj literoj ktp.) kaj ni (en IFEF-estraro) certe povos helpi al vi finfari kaj aperigi la paĝon. Tia laboro helpas diskonigi IFEF al ekstera mondo, interalie dank' al la kategorioj, kiuj aperas fine de la paĝo. Interesiĝanto ekz. pri fervojo, konsultante la kategorion "fervojo" en sia lingvo, tiel povas vidi ankaŭ ligilon al IFEF.
**Laurent Vignaud**

### Komune en fervojmuzeo

Grupo de 5 studentoj de *Jan Perner* Transportfakultato (*Pardubice*) komune kun 8 ĉeĥaj esperantistoj fervojistoj kaj E-favorantoj vizitis la 16-an de Majo 2019 Fervojmuzeon de Ĉeĥaj fervojoj (*ČD*) en moravia urbo *Olomouc.* Tiun ĉi fakan ekskurson organizis Ladislav Láni kun Jaroslav Matuška jam duafoje (lastjare vizitis tiun ĉi muzeon grupo de sep esperantistoj). La muzeo troviĝas en objekto de iama remizo kaj funkcias ĉefe kiel deponejo de *ČD*-Fervojmuzeo en *Lužná u Rakovníka*. Por publiko ĝi estas malfermita post mendo. Dum la ekskurso eksciis la studentoj multe da


Partoprenantoj de la ekskurso

interesaj faktoj pri komenco kaj historio de la fervojtrafiko en ĉeĥaj landoj: la unua vaportrajno ekzemple alvenis el Vieno al *Brno* la 7-an de Julio 1839 (la saman tagon vespere okazis la unua fervojakcidento sur tiu ĉi nove malfermita linio). Oni vidis ankaŭ lokomotivon 317.303 – la duan la plej aĝan servantan vaporlokomotivon ĉe *ČD* produktitan en 1898 en *Maschinen-Fabrik der priv. Österreichisch-ungarischen Staatseisenbahn*, *Wien Florisdorf*. La plej granda parto de klarigo de nia ĉiĉerono - eks-lokomotivestro kaj fervoj-spertulo s-ro Hanzal koncernis teknikajn vidpunktojn de eksponitaj vapor- kaj dizellokomotivoj, motorvagonoj, pasaĝervagonoj kaj aliaj eksponaĵoj (ekz. dizela motoro K 12 V 170 DR por ĉeĥaj lokomotivoj kaj motorvagonoj; diversaj partoj de vaporlokomotivoj ktp.). Studentoj povis trarigardi kromalie kondukejon de la vaporlokomotivo 464.202 (ĉeĥe alinomata *Rosnička*), produktita en la jaro 1956.

Post fino de la ekskurso okazis renkontiĝo de esperantistoj en restoracio *„U Jelena“* (Ĉe la Cervo). Dum la tagmanĝo kaj biergustumado oni diskutis pri ĵus okazinta kaj pri venonta IFEF-kongresoj kaj aliaj aktualaĵoj. Laŭ la takso de partoprenantoj estis ekskurso sukcesplena. Pro tio ĈeFEA aranĝos venontjare similan fakan renkontiĝon komunan de studentoj kaj esperantistoj-fervojistoj.

**Jaroslav Matuška**

### 10-jara datreveno de ĈeFEA r.s.

La 1-an de Junio rememoris 24 gepartoprenantoj la 10 - jaran ekzistadon de la Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio dum renkontiĝo en *Česká Třebová*. En programo estis vizito de firmao CZ LOKO, kiu nunjare festas 170 – jaran seninterrompan funkciadon. Komence ĝi estis riparejo de vagonoj kaj lokomotivoj kaj post multaj ŝanĝoj kaj transformadoj ĝi estas nun moderna fabriko, kiu modernigas malnovajn lokomotivojn kaj eĉ produktas novajn lokomotivojn kaj motorvagonojn por enlandaj kaj eksterlandaj klientoj.

Post la ekskurso al CZ LOKO okazis komuna fotado ĉe memorŝtono en la proksima parko *Javorka*, kiu estis instalita omaĝe al la 50 – jara



Ĉe memorŝtono

datreveno de fondo de Esperanta rondeto „Amikeco" en *Česká Třebová* en la jaro 2010. La programo daŭris post refreŝiĝo en restoracio *Javorka* per mallonga prezento de la ĈeFEA historio – la motivo kiu gvidis al fondo de la asocio, ĝiaj sukcesoj kaj perspektivoj. Simile estis prezentita historio de fervojriparejo per gravaj eventoj de ekesto en 19-a jarcento ĝis hodiaŭ. Je la fino de aranĝo estis prezentitaj fotografaĵoj kun rakontado pri la triopa kongreso en Malago. Gepartoprenantoj estis kontentaj kun agrable pasigita tago, inter ili ankaŭ karaj gastoj: s - ino L. Chaloupková, vicprezidantino de Ĉeĥa Esperanta Asocio, s - ro L. Patek el Aŭstrio kaj s - ro I. Laníček.

**Ladislav Kovář**

## Amuza anguleto

Iam sendis Baťa siajn komercistojn dise en la mondon por serĉi lokojn, taŭgajn por komercado. Revenis unu el malriĉa lando kaj raportis: „Neniu ebleco por vendi ion. Homoj estas malriĉaj, plejofte paŝadas senŝue." Baťa reagis „Ho, vi stultulo. Tuj revenu kaj konstruu tie ŝufabrikon. Ni surŝuigos ĉiujn!"

